



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2011 numero 3-a: julio-oktobro

dissendo je la 15-a de aŭgusto



Fotis Claude Gacond la 20an de septembro 2010.

Septembre ĉe la lageto Bachalpsee super Grindelwald migrantoj admiras la pejzaĝon. Kiam la elpaŝtitaj herbejoj senfloras kaj la ĉielo sennubas, tiam la montaro akiras gigantan amplekson. Horizonte detalege desegniĝas suproj kaj glaĉeroj kaj proksime la razenigitaj paŝtejoj neordinare reliefiĝas. Aŭtune la sciemo ne plu direktiĝas al la nomoj de la floroj, sed al tiuj de la alpoj. Laŭ mapa konsulto dekstre de la Supera Glaĉero de Grindelwald vicas la alpaj suproj Lauteraarhorn, Schreckhorn, kaj tute centre la plej pinta estas la fama Finsteraarhorn atinganta 4274 metrojn de alteco.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

Redaktaj datlimoj

2011-5 : novembro-decembro :
oktobro 10, dissendo 1-an de novembro.
2012-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 1-an de januaro.
2012-2 : marto-junio :
febuare 10, dissendo 1-an de marto.
2012 3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mürger, kasisto, Rue Centrale
4, 2112 Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.
Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Kontonumeroj de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Ĉefa konto 17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

VASTE kaj DIGNE 12-128564-4
(por subteni informadon-varbadon)

Festlibro Gacond 12-718814-7

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
Muttenz. Tel. : 076 460 89 92.
Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

Vivo de SES

2011-3 • Redaktis: Stefano Keller



Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, okazinta la 26an de marto 2011, en Hotelo Pestalozzi, Lugano



Estrarar partoprenanta :

Mireille Grosjean, kun-prezidanto; Dietrich Weidmann, kun-prezidanto; Nelida Weidmann, estrarano; Stefano Keller, sekretario.

Senkulpiĝoj: Marie-Louise Mürger (estrarano), Nancy Fontannaz, Bruno Graf, Dorothee Baumgartner, Luc Allemand, Richard Schneller, Elisabeth kaj Dominique Demestral, Nicole Bérout-Focke, Giuseppe Castelli, Verena kaj Gabriel Chaves-Walder.

Tagordo

1. Bonvenigo, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj.
2. Aprobado de la tagordo.
3. Elektado de voĉnombrantoj.
4. Evoluado de la membraro.
5. Aprobado de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2010.
6. Vivo de la societo: aprobado de la estrarraporto.
7. Financoj. Prezento kaj aprobado.
8. Elektado de kaskontrolantoj.
9. Projektoj por 2011.
10. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s.
11. Buĝeto 2011. Prezento kaj aprobado.
12. Diversaĵoj.

1. Bonvenigo, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpigoj.

Mireille Grosjean malfermas la kunsidon. Ŝi dankas ĉiujn, kiuj venis el foraj lokoj de Svislando, ĝojas pri malkovro aŭ revido de esperantistoj el Tiĉino, bonvenigas gastojn el Italio kaj la preleganton de la tago, D-ron Tazio Carlevaro. Ŝi senkulpigas la forestantojn, kiuj pri tio petis. Ĉeestas ĉirkaŭ trideko da personoj, sed la liston de ĉeestantoj plenigis per siaj indikoj nur 23 el ili.

Stefano Keller anoncas, ke por arkivado kaj redaktado de la protokolo de la kunveno li sonregistras ties disvolviĝon.

2. Aprobo de la tagordo

La tagordo aprobitas unuanime.

3. Elektado de voĉnombrantoj

Oni elektis *Claude Gacond* por voĉnombranto.

4. Evoluado de la membraro

Mireille Grosjean emfazas, ke la jaro 2010 estis pozitiva ĉar okazis kresko de nia membraro je 22 membroj. Kaj tiu cifero povus esti pli alta, se la kvindekono de svisoj kiuj estas nur UEA-membroj, enirus ankaŭ SES-n kiel membroj.

SES perdis pasintaŭtune unu el siaj elstaraj membroj, D-ron *Arthur Baur*, redaktisto de *Landbote*, verkisto pri la alemana lingvo, aŭtoro de 'La fenomeno Svislando', longdaŭra parolisto de Svisa Radio Internacia.

5. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2010

La protokolo aprobitas unuanime.

6. Vivo de la societo: Aprobo de la estrarraporto

Mireille Grosjean memorigas pri la konkludo de la raporto: pli kaj pli ekestas agadoj diversloke en Svislando, en lokaj kluboj, dum fakaj kunsidoj; ekaperas novaj aktivuloj. Ŝi emfazas la neceson turni niajn agadojn pli kaj pli al la ne-esperanta mondo ĉirkaŭ ni.

Dietrich Weidmann aldonas informojn pri Vikipedio: kreskas ĝiaj esperantaj paĝoj pri Svislando. Li invitas la ĉeestantojn al utiligo de Vikipedio kaj al kontribuo en ĝi.

Nicole Margot gratulas la esperantajn vikipediistojn pro la atingo ke en tiu libere redaktebla enciklopedio reta ŝi trovis multe pli informriĉajn paĝojn pri diversaj temoj en esperanto ol en aliaj lingvoj.

Stefano Keller diras, ke okaze de serĉadoj per Guglo, preskaŭ ĉiam troviĝas vikipediaj ligoj inter la unuaj rezultoj sur la unua paĝo responda. Tial estas bone ankaŭ per tiu maniero videbligi esperanton, kreante kaj plibonigante, pliriĉigante esperantajn paĝojn en Vikipedio.

La estrarraporto 2010 aprobitas unuanime.

7. Financoj: Prezento kaj aprobo

Mireille Grosjean resumas la okazaĵojn koncerne la kasistoshanĝon pasintjaran. Kiam *Hans-Werner Grossmann* deziris retiriĝi el tiu funkcio, sinproponis por la plenumo de kasista funkcio *Marie-Louise Mûnger*, kiu baldaŭ devis pludoni la

taskon pro sanproblemoj. *Mireille Grosjean* transprenis la laboron kiun ŝi efektivigis kun la afabla helpo de *Hans-Werner Grossmann*. Rezulte de ŝia strebado la jarkalkulo povis aperi en nia organo antaŭ la jarkunveno. Post vana helpo de nova kasisto, *Hans-Werner Grossmann* akceptis repreni la profesion prizorgadon de la financoj de SES, sen re-eniri la estraron. Tiu situacio estas statute ebla. La informojn al la denove komisiita kasisto pri la financaj aspektoj de niaj planoj kaj laboro transdonos la kunprezidantino. La asembleo aprobas tiun solvon.

Dieter Rooke laŭtlegas la raporton de la kaskontrolantoj (*Dieter Rooke* kaj *Barbara Pochanke*) pri la jaro 2010. La jarkalkulo kaj bilanco 2010 estas aprobitaj de 25 voĉoj.

8. Elekto de kaskontrolantoj

La ĝisnunaj kaskontrolantoj Barbara Pochanke kaj Dieter Rooke pretas plue plenumi la taskon.

9. Projektoj por 2011

Jam la okazigo de tiu ĉi kunveno estis parto de niaj projektoj, laŭ kiuj ni vigligu la esperantan vivon en la plej diversaj regionoj de Svislando. Tion substrekas *Mireille Grosjean* konstatante la sufiĉe heterogenan konsiston de la ĉeestantaro el loĝloka vidpunkto (diversaj partoj de Svislando kaj alveno de gastoj el Italio). Okazos aliaj eventoj: a) ĝenerala asembleo de Svisa ILEI-sekcio (SIS, la 18-an de junio, en CDELI). SIS bezonus vigligon, do instruantoj esperantistaj ne nur de la

lingvo estas bonvenaj aliĝi kaj kreskigi la 16-membran sekcion. *Mireille Grosjean* memorigas al la ĉeestantoj la utilon partopreni en la studsabatoj de CDELI en La Chaux-de-Fonds, kiuj disvolviĝas laŭ tri niveloj.

Sekvos inter la eventoj festotago honore al *Claude Gacond* 80-jariĝinta, la 27-an de aŭgusto 2011, en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Tie ĉeestos ankaŭ altranguloj de la urbo kaj de la biblioteko, festlibro kaj speciala kajero de SES-informas estos solene transdonataj al la jubileulo. La dimanĉon okazos daŭrigo de la festado en La Sagne (kie li estis instruisto) kaj en ties regiono en pli ferieca formo, organizita de Claude mem. Vizito al CDELI la lundon matene estos la ferma programero de la evento por tiuj, kiuj venos el eksterlando aŭ el Svislando kaj volos tiel resti pli longe kun la festato.

Mireille Grosjean daŭrigas la listigon de eventoj per *SFERO* la Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo, kio jam iĝis kutima jara aranĝo, organizata de kelkaj iniciatemaj esperantistoj. Ĝi okazos inter de la 14-a ĝis la 16-a de oktobro 2011, en la junulargastejo de Richterswil, rezulte de la laboro de la ĉi-jara organiza teamo: *Nelida Weidmann*, *Marion Bëlisle*, *Mireille Grosjean* kaj *Linda Weidmann*. La ĉeestantaro konsistas grandparte el familioj kun infanoj, sed ankaŭ el aliaj feriemuloj esperantistaj, kiuj deziras travivi agrabletosan, gajan kaj aktivan

semajnfino inter uzantoj de la internacia lingvo.

Mireille Grosjean memorigas pri la sugesto de *Nicole Margot*, esprimita en la pasintjara kunveno en Wil, laŭ kiu estus bone regule okazigi eventojn, kunvenojn en diversaj lokoj en Svislando. Jam ekmaturiĝas projektoj por 2012.

Nicole Margot prezentas alian eventon de 2011, temas pri kultura sabato en Lausanne, okazonta la 24-an de septembro. Ĝi konsistos el vizito al la kantona muzeo pri geologio. Ĉiĉeronos kaj parolos pri paleontologio *Nicole Margot* en esperanto dank'al ŝia pretigo fare de geologo, kiu mem interesiĝas pri esperanto. Estus do sencohava la aliĝo de esperantistoj ankaŭ el aliaj lingvoregionoj de Svislando. La laŭzananjoj pretigas allogan programon por la tago (kun nekutima vizitode Laŭzano kaj prelego pri rekta demokratio).

Dieter Rooke anoncas sian prelegon pri esperanto kaj la laborista movado, kion li faros kadre de la socia forumo de St. Gallen la 14-an de majo.

10. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI-sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s.

Mireille Grosjean konstatas, ke nuntempe ne ekzistas iu tutsvisa grupo organizita de junuloj, tamen estas junuloj diversloke, kiuj aktivas, kunvenadas. Pri Pasporta Servo ŝi

mencias la transforman periodon transiran al reta funkciado kaj revenan al la papera eldonaĵo de gastigantoj. *Luko Allemand* estas ĝia svisa peranto. En la listo de gastigantoj svisaj troveblas esperantistoj, kiujn oni eble eĉ ne jam vidis en kunvenoj.

11. Buĝeto 2011. Prezento kaj aprobo.

Mireille Grosjean informas pri tio ke la estraro altigis la subvencian sumon al 900 svisaj frankoj, por subteni diverslokajn eventojn, kiuj havas pli signifan aŭ tutsvisan karakteron, informadon al ekstero. Ŝi mencias pri sia baldaŭa vojaĝo al Burundo, kien deziras kunporti apoge Plenan Ilustritan Vortaron (PIV) kaj kelkajn poŝlibrojn por lernantoj de esperanto, sugestante dediĉi iomete de la subvencia sumo al subteno de esperantistoj, kreiĝantaj movadoj en malriĉaj landoj.

Stefano Keller subtenas tiun proponon, memorigante pri siaj plentempaj instruaroj apud *Claude Gacond* en KCE, substrekante la utilon de tio, ke li regule uzis kaj uzis PIV-on al la lernantoj dum la kursoj.

Dietrich Weidmann atentigas pri la neceso havi kaj uzi Plenan Ilustritan Vortaron en ĉiu esperanto-centro de la mondo por eviti dialektiĝon rezultantan el loka difino de vortoj, sen referenci al PIV.

La asembleo aprobas la buĝeton unuanime.

12. Diversaĵoj.

Nicole Margot interesigas la ĉeestantojn pri la laboro de la etnistoj, kies organon, *Etnismo*, ŝi redaktas kaj sugestas trafoliumi la ekspoziciitajn numerojn traktantaj la problemojn de minoritatoj. Ŝi reparolas pri la laŭzana muzeo-vizito kaj informas, ke tie videblas la sola skeleto dinosaŭra en kaj de Svislando. Ankaŭ mamuta skeleto admireblas en la muzeo.

Mireille Grosjean aldonas sugeston pri foja vizito al la spuroj de dinosaŭroj, kiuj troveblas apud Soluturno. Tio povus esti kombinita kun ŝipa vojaĝo al Bielo.

Charlotte Blanc informas pri apero en esperanto de la bildstria libro: *La sekreto de Lasko* (Le secret de la

forêt de Lascaux), tradukita de la grupo esperanta de Périgourdin, Francio.

Eskil Svane demandas ĉu aperos informoj en la gazetaro (esperanta kaj loka, tiĉina) pri nia kunveno. *Mireille Grosjean* diras ke ŝi sendis gazetarajn komunikojn al kvar lokaj ĵurnaloj, universitato kaj gimnazio, kulturcentro, turisma oficejo. Reprezentanto de neniu el ili aperis por raporto, intervjuo. *Stefano Keller* diras ke SES devus organizi pli da eventoj en Tiĉino por ke la loĝantaro aŭdu pli pri esperanto.

Informoj pri la libroservo, tagmanĝo, vespera prelego de *Tazio Carlevaro*, komuna fotado.

Fino de la kunsido.

Protokolis elektronike kaj skribe: *Stefano Keller*, *sekretario de SES*.

Sonregistraĵo de la kunveno estas aŭskultebla kaj elŝutebla el la retejo de SES:

www.svisa-esperanto-societo.ch/sono/Ghenerala_Kunveno_SES_Lugano_2011.mp3



Donacoj ricevitaj 01.01. - 30.06.2011 ***(Vaste kaj Digne + Ĝenerala konto)***

Bachmann Louise (15), Bornet Laure (25), David Buhlmann (30), Carlevaro Tazio kaj Teresita (100), Cometta Claudio (15), Dovat Lucienne (100), Ducret Aïdonidis Laurence (30), Eisenegger Elisabeth (15), Elsner Verena (40), Fiaux Monique (10), Friedly Georgette (15), Gacond Claude kaj Andrée (30), Gessler Claudia (35), Glättli Ernst (15), Grabowski Elzbieta (25), Huguenin François (65), Huguenin Noël (40), Humbert Fink Yvette (15), Koller Alois (30), Lavanchy Jean-Jacques (30), Meier Hans (30), Morocz Piroška (30), Oertle Karin (5), Rey Hans (15), Rivière Jimmy (30), Sandoz André (400), Scherer Paul (20), Tanner Adrian (15), Van Pujenbroek Ruth (5), Vigny Marc (25), Viredaz Marguerite (25), Vité Paula (15).

Entute: CHF 1295. Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES !

Patronoj 2011:

Badoux Françoise, Bornet Laure, Buhlmann David, Gacond André, Gaxer Walter, Gessler Claudia, Hasler John, Humbert Fink Yvette, Koller Alois, Ducret Aïdonidis Laurence, Lavanchy Jean-Jacques, Ortelli Luciano, Portmann Braun Antoinette, Rivière Jimmy, Scherer Paul.

2.7.2011/HWG



Svisa Esperanto-Societo ***Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2010***

Svisa Esperanto Societo

RAPORTO DE LA KASKONTROLANTOJ POR LA JARO 2010

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Barbara Pochanke, ricevis chiujn necesajn dokumentojn hejme perposhte. Ni povis tralegi kaj studi ilin trankvile. Poste ni povis starigi demandojn al Mireille Grosjean, kiu en januaro 2011 zorgis pri la financoj de SES. Ni obtenis kontentigajn respondojn.

La ciferoj de la prezentata bilanco je 31.12.2010 kaj de la jarkalkulo 2010 kongruas kun la saldoj de la kontoj.

La pruviloj de difinitaj elspezoj, kiujn ni detale kontrolis, kongruas kun la registritaj sumoj en la kontoj.

La librotenado estas bonorde farita.

Samtempe ni ekzamenis la apartan konton « Enciklopedio », kiun Sinjoro Hans-Werner Grossmann prizorgas por CDELI kaj SES. Ankaŭ tie la librotenado estas bonorde farita.

Ni dankas multe al la tri personoj, kiuj zorgis pri la librotenado de SES dum 2010 : Hans-Werner Grossmann, Marilu Mürger kaj Mireille Grosjean.

Ni rekomendas aprobi la jarkalkulon 2010 kun plienspezoj de CHF 2378.72 kaj la bilancon je 31.12.2010 kun kapitalo de CHF 48145.30 kiel ankaŭ la konton « Enciklopedio » kaj malsharghi la kasistojn kaj la estraron.

Loko : *Genevo*

Dato : *2011 2 1*

Wal

1 02. 2011

Nomo :

Subskribo :

Rooke, Dieter

D. Rooke

Barbara Pochanke

B. Pochanke



Pri Claude Gacond kaj lia festo (rememorigo)

*27-28-29-ajn de aŭgusto 2011
en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds
kaj en La Sagne*

Jam en 1954 Claude Gacond komencis savi arĥivaĵojn el diversaj planlingvoj. Per tio li ekkreis la bazan kolekton de libroj kaj dokumentoj, kiuj konsistigis la havaĵon de starigota planlingva arĥivejo. Sekve, li fondis en 1961 CDELI-n (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia), kio en 1967 iĝis definitive kaj statute la planlingva fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Kun la ĉefa studobjekto altlerneja „Interpopola konduto“, en 1968 Claude Gacond kunfondis Kulturalan Centron Esperantistan (KCE) en Bielo, kion samjare li ekfunkciigis en sia hejmo en La Sagne, kiel esperanto-studejon. En 1974 li instalas KCE-n en La Chaux-de-Fonds, kie lia projekto pri internacia studcentro evoluis al sep-doma „Esperanto-kvartalo“ de la urbo, kun eblo gastiga por la restado de lernantoj, partoprenantoj de kursoj, staĝoj, seminarioj, kolokvoj kaj renkontiĝoj okazintaj dum la tuta jaro.

Per la kreo de tiuj institucioj (CDELI kaj KCE) La Chaux-de-Fonds iĝis unu el la signifaj tutmondaj centroj por esperanto (instruado, esplorado, seminarioj).

Por la 80-jariĝo de Claude Gacond, Svisa Esperanto-Societo okazigos feston, sabate la 27-an de aŭgusto 2011. Ĝi disvolviĝos en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, en la CDELI-salono kaj en la aŭlo de la lernejo troviĝanta apude, en la sama konstruaĵo. Altranguloj de la urbo kaj de la esperanta movado, signifaj aktivuloj kaj kunlaborantoj, amikoj de Claude Gacond honoros lin per diversaj kontribuoj parolaj, prezentataj aŭ eĉ nur per sia ĉeesto. Festlibro (red. R. Hauptenthal, Eld. Iltis, 2011) kaj festa kajero de SESinformas estos transdonataj al la jubileulo.

La festo pludaŭros la 28an de aŭgusto dimanĉe, en la vilaĝo La Sagne, kie Claude travivis la unuan duonon de sia instruista kariero. La lasta festotago disvolviĝos kun vizito al CDELI, lunde la 29-an de aŭgusto, sub gvido de la fondinto-arkivisto, Claude Gacond.

Por pli da informoj kaj aliĝo urĝe vizitu jenajn retpaĝojn:

www.svisa-esperanto-societo.ch/gacond aŭ www.esperanto-gacond.ch/claude80jara

Stefano Keller, sekretario de SES

SFERO


Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo

la 14-15-16-ajn de oktobro 2011
Junulargastejo Richterswil, "Horn"
Hornstrasse 5 8805 Richterswil (ZH)
www.youthhostel.ch/richterswil

SFERO estas valorega renkonto. Kiam en familio la infanoj estas dulingvaj, ili ofte ne havas okazon ludi kun samaĝuloj. Dum SFERO ili havas tiun eblon: la 4-jarulo trovas aliajn samaĝajn infanojn, la 12-jarulo same. Alemanoj babilas senprobleme kun romandoj. Plenkreskuloj ludas kun infanoj. Migrado, muzikado, babilado, ludado, agrabla etoso. Internacieco ne mankas, ĉar jam kelkaj familioj venas pro la konstanta uzo de nia lingvo. En Svislando ni BEZONAS esperanton kaj uzas ĝin.

En la jaro 2011 meze de oktobro ni havos belan ŝancon loĝi en junulargastejo en Richterswil (ZH) ĉe la zurika lago. Bela domo moderne ekipita. Diversaj lokoj ne mankas. La infanoj povos ĝui la viziton de la KNIE bestoĝardeno en Rapperswil (SG).

Por pli da informoj vizitu jenajn retpaĝojn:




www.svisa-esperanto-societo.ch/sfero kaj www.esperanto.ch/sfero/chefpagho.html

Ni atendas vin!!

Mireille Grosjean, kun-prezidanto de SES, kun-organizanto de SFERO 2011



Kultura semajnfino en Laŭzano: vizito al la kantona muzeo pri geologio la 24-25-ajn de septembro 2011




Alloga, varia programo atendas la partoprenantojn de kultura semajnfino en Laŭzano ĉi-aŭtune.

Dum la sabata vizito en la muzeo pri geologio ĉiĉeronos kaj klerigos nin en esperanto *Nicole Margot* pri paleontologio, dank'al ŝia pretigo fare de fakulo de la institucio. Venu saluti la solan restintan dinosaŭron de Svislando, kio skelete atendas vin en ekspoziciejo.


Post la enmuzea rondiro, malkovrinte interesaĵojn, la *Mara Bartoli* gvidos nin enurbe dum nekutima vizito de Laŭzano. En la programo estas prelego pri rekta demokratio, fare de nia fakulo pri la svisa politiko, *Daniel Schöni Bartoli*.

Por la dimanĉo pretiĝas interesa programo. Estas do sencohava la aliĝo de esperantistoj ankaŭ el aliaj lingvoregionoj de Svislando.



La geologo de la muzeo simpatias kun esperanto. La bulteno de la asocio de la amikoj de la muzeo jam anoncis nian viziton! Venu ankaŭ vi!

Nicole Margot



Pri la UEA-peranteco en Svislando ***Komuniko***

Ĝis nun nia peranto por kontaktoj, mendoj kaj pagoj al UEA estis ties ĉefdelegito por Svislando, Francisko Randin en Lausanne.

Pro la fakto ke UEA havas poŝtkonton en Svislando (12-2310-0), Francisko deziras retirigi de la peranteco. Li klarigis la kompletan situacion detale dum estrarkunveno en Lugano la 26an de marto 2011. La estraro de SES komprenas kaj akceptas lian decidon.


Tamen Francisko plu estas nia ĉefdelegito.

Konsekvence: por viaj pagoj kaj mendoj ĉe UEA bonvolu rekte rilati kun ĝi.

Ni esperas, ke tiu ŝanĝo ne ĝenos vin.

Nome de la estraro de SES : Mireille Grosjean

Hazardludo en Svislando ***Prelego de d-ro Tazio Carlevaro***



Kiuj tranoktis en Lugano post la jarkunveno de SES, tiuj havis la privilegion aŭdi vivoplenan kaj pripensigan prelegon de d-ro Tazio Carlevaro, psikiatro nun dediĉanta grandan parton de sia aktiveco al la problemoj kaŭzataj de la hazard- kaj mon-ludejoj.

Per klarigaj bildoj li komprenigis, ke fakte ne la ludantoj riĉiĝas, sed la kazinoj kaj loteri-organizaĵoj, kaj ke ekzistas publiko, kiu fariĝas lud-malsana, kiel alia publiko fariĝas dependa de alkoholo, drogoj kaj fumado.



Tial necesas krei preventan politikon kontraŭ la hazardluda malsano.

Raportis: Claude Gacond

La prelego troveblas en la retejo de SES: <http://href.hu/x/fo1e>

Tutsvisa aktiveco

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33

CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel.: 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

stefano.keller@ne.ch

Studsabato

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller kaj Nicole Margot.

Rezervu la sekvajn sabatojn :

Oktobre 22,

Novembre 19,

Decembre 10,

2012 Januare 21,

Februare 18,

Marte 17,

Aprile 21,

Maje 19,

Junie 16.

Multobligu kaj diskonigu la detalan informilon aldonitan al la bulteno.

Montriĝas, ke la lokaj grupoj, kiuj organizas grupan partoprenon al la studsabatoj, profitas el tio, dum tiuj, kiuj bedaŭrinde neglektas tiun klerigan eblon, videble malprogresas. Do el ĉiuj lokoj organiziĝu komunaj vojaĝoj al la studsabatoj.

-oOo-

ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Svisa sekcio. Mireille Grosjean

Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets

mirejo-mireille@gmail.com

Kunveno de la svisa ILEI-sekcio

19an de novembro

CDELI, La Chaux-de-Fonds

Mi proponas al vi kunveni en La Chaux-de-Fonds en CDELI sabate la 19an de novembro. Tiam okazos studsabato. Do venu! Ni kunvenos iel formale je la 16a horo, do kiam la studado preskaŭ finiĝas. Kompreneble vi povos partopreni la tutan studsabaton, se vi tion deziras.

Mireille Grosjean.

-oOo-

KCE


KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Postiers 27, CP 311, 2301 La Chaux-
de-Fonds

Tel. (+)032 926 74 07, / 032 926 74
12, Fakso 032 926 74 11
<kce@esperantio.net>

16-20 aŭgusto 2011


Dua Simpozio pri Homaranismo
publika kunveno de zamenhofologoj,
partoprenas ankaŭ religiaj fakuloj.



22-26 aŭgusto 2011

Internacia Naturamika Semajno
en Grindelvaldo (Berna Alparo) kun
Esperanta Naturamikaro.

-oOo



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la
malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

Venontaj kunvenoj

Aŭguste 27 : Partopreno en la
festotago en La Chaux-de-Fonds.

Septembre dimanĉe 25 : Ekskurso.

Oktobre 27 : Ni parolos pri la ferioj.

Novembro 24 : Programo 2012.

Decembre sabate 10 : Zamenhofa
festo en Svislando.

-oOo-

Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2,
Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefone : 031 911 64 72 (kun res-
pondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des
Associations, rue des Savoises 15

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

www.esperanto.ch/Lausanne

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun
unuon lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;
Sekretario : François Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88
86.

Venontaj kunvenoj

Oktobre 3,

Novembre 7,

Decembre 17 : Zamenhofa Festo.

2012 Januare 9,

Februare 6,

Marte 5,

Aprile 2.

-oOo-

Tutsvisa Kultura sabato en Laŭzano

organizita de Nicole Margot

Sabate 24an kaj dimanĉe 25an de septembro 2011

Dum la « *Nokto de la Muzeoj* » 2010 en Laŭzano oni enkondukis vizitojn de la muzeoj en diversaj lingvoj, ĉina, rusa, hispana ktp. Ĉar tiu iniciativo sukcesis, ĝi denove okazos la 24an de septembro 2011. Hazarde Nicole Margot havis la okazon proponi viziton de la geologia muzeo en Esperanto kaj ŝia propono estis ricevita kun entuziasmo: « *Ni serĉis esperantistojn kaj ne trovis!* »

Por ke plej multaj el Svislando kaj aliloke estu interesataj de tiu aranĝo, kaj por ke valoru Laŭzanen vojaĝi, decidiĝis organizi kulturalan sabaton ĉirkaŭ tiu vizito. La sabato eĉ transformiĝis al semajnfino por tiuj, kiuj deziras tion. Tiel vi povos dum la « *Nokto de la Muzeoj* » en Laŭzano viziti ĉiujn muzeojn por la eta sumo de CHF 10.- (senpage por infanoj malpli aĝaj ol 16 jaroj) ĝis la 2a horo matene !

Kadre de tio okazos vizito de la geologia muzeo en Esperanto kaj diversaj aranĝoj laŭ la sekva programo.

La programo (krom la prelego de Daniel Schöni-Bartoli) povas taŭgi al infanoj komprenantaj Esperanton, kaj dum la prelego, iuj gepatroj povos zorgi pri la infanoj, ĉu vizitante muzeojn, ĉu promenante.

Programo

Sabate 24-an de septembro

- 11h00. **Rendevuo en la ĉefa halo de la laŭzana stacidomo.** Ekde tie ni kune foriros por surpriza vizito de la urbo gvidata de Mara Bartoli.
- 13h00. **Tagmanĝo** (ĉu piknike kun piknikaĵo alportita de la partoprenantoj, ĉu en memserva restoracio).
- 14h30. **Vizito de la geologia muzeo en Palaco Rumine, placo Riponne,** de la paleontologiaj kaj mineralogiaj haloj kun portempa ekspozicio pri meteoritoj, gvidata de Nicole Margot kaj Manuel Riond.

Poste en la Restoracio Le Milan, Boulevard de Grancy 54

- 16h30. Projekciado de **KD pri la geologio de la lemana regiono**, komentita en Esperanto fare de Alain Favre.
- 17h15. Prelego pri la svisa politiko, fare de Daniel Schöni-Bartoli, fakulo pri la svisa politiko.
- 19h00. Komuna vespermanĝo mendota surloke.
- 20h00. Amika vespero aŭ laŭplaĉa vizito de la laŭzana muzeoj.

Dimanĉe 25an de septembro

- 10h00. Duhora vizito de Laŭzano kaj ties reliefa pejzaĝo laŭ geologia rigardo.
- 12h00. Kun la partoprenantoj ni povos decidi pri komuna tagmanĝo.

Ni rememorigas, ke tiu semajnfino ne nur alportos al la partoprenantoj tre interesan programon. Sed ju pli multos la partoprenantoj al la vizito de la geologia muzeo, despli bonan bildon de la vivo de Esperanto ni donos al la muzeo.

Loĝado

La partoprenantoj rezervu mem sian loĝejon. Kiel plej malmulte kostajn hotelojn ni povas konsili :

- **Lausanne Guesthouse & Backpacker** - Hostel, chemin des Epinettes 4 (Centre kaj proksime de la restoracio Le Milan). Rezervoj nur per reto aŭ per fakso: 021 601 80 01.

- **Minotel Crystal - Lausanne**, Chaucrau 5, centre. Tel: 021 317 03 03.
- **Hôtel Du Marché**, Rue Pré-Du-Marché 42, centre. Tel : 021 647 08 18.
- **Hotel Union**, Ch. des Croisettes 2, 1066 Epalinges, ĉe la lasta haltejo de la metroo, je 15 minutoj de la centro. Tel : 021 653 89 89.

Aliĝoj sendotaj al Nicole Margot kun la sekvaj indikoj

- Nomo(j) de la partoprenanto(j) :
- adreso (retadreso, telefonnumero) :
- Partopreno en la vespermanĝo en Le Milan : Jes/Ne.
- Partopreno en la dimanĉa programo : Jes/Ne.
- Sendu ĝis la 20a de septembro al Nicole Margot, Chemin des Lys 4, 1010-Lausanne. Tel: 021 653 14 67. Retadreso: <n.margot@bluewin.ch>.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientisvislando)

www.esperanto.ch/wil

Prezidanto: Verena Chaves-Walder,
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071
393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Septembre 7 : Forumteatrumado.

(Ĉekomence rakonta rondo.)

Decembre 7 : Rakledvespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

Troveblas nia nova programo ankaŭ jene :

<http://www.fischer-zim.ch/esperanto/eok-wil/kalendaro.htm>

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum officejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1


<http://esperanto.ch/zuriko>.

-oOo-

Kalendaro de Svisa Esperanto-Societo

Por informiĝi pri la plej aktualaj programoj de la diversaj svisaj esperanto-grupoj kaj ekscii pri novaj eventoj, vizitu la kalendaran retpaĝon de SES :


<http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro/>



Kongresen

Svislando en la 96a Universala Kongreso de Esperanto Kopenhago, 23-30 julio 2011

Dudeko da svisoj ĉeestis la ĉi-jaran plej grandan esperanto-eventon. Nome de Svisa Esperanto-Societo la kongreson salutis *Mélanie Maradan*,



Stefano Keller, Mélanie Maradan, Seán Ó Riain

kiun en aprilo 2011 la estraro de UEA nomumis komisiito pri la rilatoj kun la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) kaj kun Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio.

Stefano Keller aktivis en la estraro de UEA partoprenante ties kunsidojn, pretigante diversajn dokumentojn, informante la movadon en retaj blogoj pri la okazaĵoj. Kiel estrarano pri eksteraj

rilatoj li partoprenis en tri kongresaj konferencoj, kiuj koncernis la aleksteran agadon de nia movado ĉe gravaj internaciaj organizaĵoj.

Dimanĉon la tiutema subkomitato traktis diverslokajn aktivecojn de la komisiitoj, gvidate de Mirejo Grosjean kaj Stefano. Okaze de la Kleriga Lundo, post prelego de *Humphrey Tonkin* pri la UN-sistemo, la grandnombra ĉeestantaro povis konatiĝi kun la strukturo kaj funkciado de la Ĝeneva UN-oficejo pri homaj rajtoj, prezentita de Stefano Keller.

La marda laborseminario pri niaj ebloj kaj aktivecoj ĉe UN kaj UNESKO celis, krom plia informado, alvoki pri aktiva kunlaboro de ĉiuj esperantistoj en la interagoj de UEA kun ties ne-esperantaj partneraj organizaĵoj landnivelaj kaj internaciaj.

Ĵaŭde li laborkunsidis kun aktivuloj zorgantaj pri la projekto de UEA por indiĝenaj popoloj. La aktuala situacio de la agado estis pritraktata.

En la komitato de UEA, sed ne nur tie, aktivis *Mirejo Grosjean*. Ŝi prezentis sian agadon plenumitan en Afriko, aktivis en diversaj kunsidoj pri instruado, ekzamenoj.

Mirejo organizis farandolon. Grupo de inter sesdek kaj cent personoj ornamis sin per blankaj fruntaj rubandoj, sur kiuj grandlitere estis skribitaj en la dana lingvo la nomo de ilia lingvo. Ili kune marŝis farandole tra la urbocentro, kaj tiumaniere gaje ĝuante multajn okazojn ekrilati kun interesitaj kopenhaganoj, kaj klarigi al ili pri la komunika maniero de la esperantistoj.



Mirejo estis en la teamo de la organiza triopo de la Internacia Arta Vespero, kio iĝis granda sukceso.



Al la kongreso sendis salutmesaĝon la ĝenerala direktoro de UNESCO, *s-ino Irina Bokova* kaj alparolis ĝin inaŭgure reprezentantino de Unuiĝintaj Nacioj en Kopenhago, *s-ino Pernille Fenger*. Tiuj mesaĝoj estas legeblaj en la reto, bonvolu disvastigi la informon en blogoj, retejoj de landaj asocioj, gazetaraj komunikoj :

<http://www.lingvaj-rajtoj.org/unesco> - <http://www.lingvaj-rajtoj.org/un>

-oOo-

Por rekompenci ŝin, pro ŝia laboro por Esperanto en Afriko kaj utiligo de Esperanto por interkultura edukado, Mirejo ricevis de UEA diplomon pri *Elstara Agado*.

Tre sukcesa “svisa” vespermanĝo okazis ĉe kanalo, en agrable belega vetero, dum vigla koncerto de esperantaj kaj lokaj grupoj kaj artistoj.

Baldaŭ aperos fotoj en nia retejo pri la 96a UK, Kopenhago. Ankaŭ viaj raportoj pri kongresaj travivaĵoj kun fotoj, filmoj estos bonvenaj tie.



Barbara, Luko, Marek, Tobiasz, Stefano, Cristina

Raportis: Stefano Keller

Impresoj el Israelo

Depost longe mi intencis viziti Israelon, sed la politika situacio retenis min. En la instrukcioj de la Politika Departemento legeblas, ke la vizito de tiu lando estas risko. Tamen 7 milionoj da isrealanoj vivas inter paco kaj milito, sub daŭra tensio. Ĉiam denove palestinanoj pafas raketojn de Gaza al la israela teritorio, kelkfoje trafas homojn. Responde la israela armeo atakas palestinajn objektojn, dento por dento.

Kiam alvenis denove invito de Amri Wandel, prezidanto de la Ligo de Esperanto en Israelo, tiam mi decidis aliĝi al la israela kongreso en Cezareo kaj al la posta turisma programo 7–13 aprilo. Ĉirkaŭ 30 judoj kaj 5 eksterlandaj gastoj kongresis, kaj 3 ekskursis kun Amri Wandel per ĵipo ĝis la Ruĝa Maro, kio estis vera aventuro. Sidi en la Morta Maro legante gazeton: mirindaĵo! Grimpri en kanjonoj: risko!

Jam antaŭe Josef Ŝemer, vigla sekretario altstatura, atentigis min, ke en Israelo oni ofte improvizas, ne povas organizi pro ŝanĝantaj kondiĉoj. Efektive estis karakterize, adapti daŭre la programon. Povas ankaŭ esti malbona virto. Nu ili fieras esti majstroj de la improvizado, ĉar ĝi estas efika.

La kongreso konsistis el tagaj ekskursoj kaj posta socia-kultura programo bon-nivela. Mi rakontis pri la *Svisa Enciklopedio Planlingva* kaj pri svisaj pioniroj. La laŭstatuta jarkunveno okazas vintre en Tel

Avivo. La landa asocio nombras ĉirkaŭ 100 membrojn. Dufoje jare aperas bele farita organo, *Israela Esperantisto*. Mi havis la impreson, ke la landa movado forte agadas kaj vigle interrilatas.

Cezareo situas inter Tel Avivo kaj Haifa ĉe la maro. Herodo konstruigis tiun urbon je la gloro de la romiaj regantoj. Ni vizitis la imponajn elfosaĵojn kaj la romia kulturo iĝis reala. Alian tagon ni promenis en naturparko, kie iam vivis krokodiloj. Emociplena por judoj estas la tendaro-muzeo de kontraŭleĝaj judaj enmigrintoj. Ili travivis hororojn en la kamuflitaj ŝipoj el Eŭropo, ĉar la brita armeo persekutis ilin el la aero.

Ni ankaŭ trairis kibucon, sed tie ne plu regas la tiama eŭforio. Individueco anstataŭas kolektivecon. Multaj kibucoj estas privatigitaj kaj iĝis entreprenoj. Siatempe enmigrintoj tie startis kaj hejmiĝis.

Eksterlandaj gastoj miris, ke dum la sabatoj publikaj busoj kaj trajnoj ne cirkulas, tamen multaj privataj aŭtoj veturas. Dimanĉe israelanoj rekomencas labori.

En Jerusalemo okulfrapas la ortodoksaj judoj, entute nur 5% de la enloĝantoj. Ili portas grandan nigran ĉapelon, longajn harojn, blankan ĉemizon, nigrajn vestaĵojn. Jam dum la flugo tien du rabenoj kun elligita blanka tuko super la ŝultroj kaj ledorimeno ĉirkaŭ la brako preĝis kaj gestis en la koridoro. Ĉu ni pro tio bone surteriĝis? La ortodoksoj ne servas en la armeo kaj ricevas financan helpon de la ŝtato. Dum la

reflugo tia juna ulo apud mi studis seninterrompe la Talmudon. Mi supozas, ke ili vivas en la biblia erao.

Bedaŭrinde mankis la tempo por digne viziti la malnovan urbon, kiu estas pli ol dumiljara kaj entenas tiom da vidindaĵoj. Mi povis rigardi nur la faman Muron de la judoj kaj la vojon *Via dolorosa*. Atendante rondirantan buson ni estis ŝokitaj de sireno kaj de ekaperintaj policaj veturiloj. Estis alarmo kaj danke al niaj esperantaj amikoj ni komprenis, ke oni devas forkuri. Specialistoj traserĉis la lokon kaj buson. Ne montriĝis danĝero, sed estis timiga momento. Israelaj esperantistoj komentis : « *Jen nia vivo !* »

La israela ŝtato estas bone organizita, batalema. Oni vidas multajn soldatojn kaj soldatinojn kun ŝarĝitaj fusiloj. Viroj tiel deĵoras 3

jarojn, virinoj 2. Min surprizis ankaŭ la longa sekuriga muro, kiu disigas la israelan de la palestina teritorio. Ĉe trapasoj en la flughaveno, en stacidomoj, kaj en placoj de la malnova urbo Jerusalemo, funkcias radarkontroloj.

Estas respektinde, kiom la juda popolo atingis ene de 60 jaroj. Modernaj novaj urbopartoj kun altaj blankaj domoj konstruiĝis. Ekzemple Jerusalemo havas nun 600'000 enloĝantojn. Ĝi situas 600 metrojn super la maro kiel bastiono. La trafiko estas densa, la aŭtoj akumuligas, ĉar mankas metroo. En gvidlibro mi legis la spritan eldiron : « *En Haifa oni laboras, en Tel Avivo oni vivas kaj en Jerusalemo oni preĝas* ».

Bruno Graf

-oOo-

Paska renkontiĝo en Aalen

Karaj legantoj, jen mi rakontos pri esperantista renkontiĝo okazinta dum la paskaj tagoj en Aalen, Germanujo, de la ĵaŭdo 21.04 ĝis la lundo 25.04.

Ĉu vi konas Aalen ? Ĝi estas ĉarma urbo ne tro granda (ĉirkaŭ 60'000 enloĝantoj) situanta sude de Germanujo, iom oriente de Stuttgart kaj norde de Ulm. Tie troviĝas malnova urbo kun spionturo, pli modernaj kvartaloj, speciala panejo en formo de kubo brilruĝe pentrita nomata *pankesto*, - tiu fariĝis ĉefa gvidsigno por mi -, biblioteko kun esperanta sekcio, esperanta klubo

kunvenanta ĉiulunde, kaj, plej grave, laŭ mia persona vidpunkto, en tiu urbo loĝas Barbara, mia koramikino, kiun mi renkontis dum la UK en Kubo.

Tie ankaŭ loĝas Inge (ofte nomata *panjo Inge*), kiu organizis kiel ĉiujare la paskan renkontiĝon supre cititan, kaj je tiu okazo gastigis grupeton da esperantistoj el Germanujo, Francio kaj Svislando. Nu, se vi volas detalon, partoprenis sep germanoj, (el tiuj kvar el Aalen mem), unu franco, kaj unu sviso (mi). Sed tiuj statistikoj havas nur tre relativan signifon, ĉu ne ?

Nu, nun mi rakontu de la komenco, laŭ mia vidpunkto :

Dimanĉe 17.04. Mi trajnas el La Chaux-de-Fonds al Aalen, alvenas vespere post 6-hora veturado. Barbara akceptas min en la stacidomo kiel kutime, kaj ni piediras al ŝia hejmo.

Lunde ni estas invititaj ĉe ŝia patrino en Bettringen apud Schäbisch Gmünd kaj ili malkovrigas al mi belan arbaron sur la monto *Rosenstein*.

Ni pasigas la mardon trankvile, ĝuante la ferion, nenion vere farante. Ni eĉ momenton kuŝas sur herbo en parko, serĉas kvarfoliajn trifoliojn aŭ rigardas infanetojn, kiuj ludas per balanciloj. Iam ni tamen moviĝas por iri al la esperanta biblioteko, kie Barbara laboras dum horo kaj duono. Dume mi tralegas interesajojn kaj iom librumas.

Merkrede kaj ĵaŭde mi devas mem okupiĝi dum Barbara laboras en sia kafejo (la plej bona de la urbo laŭ iu spertulo). Tion mi senenue faras skribante poŝtkartojn, revizitante la esperantan bibliotekon, aŭ grimpante al *Aalbäumle*, loko kun ligna turo supre de monto en arbaro apud la urbo.

Ĵaŭde vespere komenciĝas la paska renkontiĝo en vietnamia restoracio apud la stacidomo. Tie ni retrovas kelkajn kaj pli poste ankaŭ retrovas nin aliaj homoj. Interalie bongustas gujav-suko.

Ni sekve ĉiuj tranoktas ĉe Inge kaj Jürgen. En la etaĝo de la domo, sub la tegmento, estas granda spaco, kie ĉiu povas kuŝigi matracon prenit

el angulo de la ĉambro, kaj poste mem kuŝiĝi sur ĝin.



La ligna turo

Ĉe la muro, ĉe trabo kaj ĉe centra ligna kolono pendas nenombreblaj marionetoj kaj pluraj aliaj strangaj aŭ dekoraciaj objektoj.

Matene ni okope ĉirkaŭsidis ĉe la tablo de Panjo Inge kaj ĝoje matenmanĝas, antaŭ ol ekveturi por ekskurso. La celo estas la *Lonetal*, kie ni vizitas groton *Charlottenhöhle* kaj poste promenas vizitante aliajn grotetojn, kie iam vivis prahomoj.

Ni alvenas antaŭ ŝlosita grot-enirejo, en kiu oni trovis leonhomon. Temas pri laŭdire plej aĝa statuo farita de homa mano. Ĝi estis skulpita el mamuta eburo per ŝtono, antaŭ ĉirkaŭ 32'000 jaroj. Inge multe rakontas pri tio, ŝi estas tre dokumentita.

Dimanĉe dum nia ekskurso en Ulm ni vizitos historio-muzeon en kiu troviĝas la vera preparolita statuo,

kiu efektive havas korpon de homo kaj kapon de leono.

Sabate ni ĝuas trankvilan tagon, grimpas ĉiuj kune al Aalbäumle

studante la printempajn floretojn, fotante multe, kaj supreniras la turon.



La grupo en la turo de Aalbäumle : Armin, Norbert, Jofen, Luko, Barbara, Laurent, Aleksandr, Jürgen, Cornelia, Inge.

Dimanĉe ni trajnas al Ulm. Post vizito de la muzeo retrovas nin Emi, alia bonkora esperantistino, kiu gastigis min en tiu urbo lastaŭtune dum mia bicikla vojaĝo al Aalen. Ŝi nun fariĝas nia ĉiĉeronino ! Kaj ege bone, ni tiel paŝas sur la muro de la malnova urbo, preterpasas kaj transpasas la rivereton *Blau*, vidas deklivan hotelon, belajn kvartaletojn, la katedralon... Estas ja bela tago kaj ni (almenaŭ Barbara kaj mi) fine lacas, kiam je la dudeka horo ni reentrajniĝas kaj unu horon poste alvenas en Aalen. Tamen ni kune pretigas vespermanĝon kaj iĝas vere malfrue, kiam nia tago vere finiĝas.

En Aalen ankaŭ troviĝas kelkaj restaĵoj de la antikva romia civilizacio. Tiurilate oni konstruis termobanejon per modernaj teknikoj sed laŭ romia stilo. Tion ni ĝuas lunde, kaj mi miras antaŭ la beleco de la lokoj. Ja plaĉas al mi tio ; en tiu arkitekturo oni sentas sin kiel bananta romiano !

Estas iom triste, kiam ni sentas la finon de la renkontiĝo... Geamikoj foriras fine de la tago, kelkope ni ankoraŭ vespermanĝas ĉe Inge, revenvojaĝo al Svislando estos por mi morgaŭ.

Luc Allemand

Redaktas: Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Geologia semajnfino en Laŭzano

(24-a de septembro 2011)

Nicole Margot

Enkondukaj vortoj

Mi ne scias ĉu vi tiom malkleras pri geologio kiom mi, kiam mi decidis pretigi tiun laŭzanan semajnfino. Kiel mi vi certe lernis en la elementa lernejo, ke nia regiono estis foje komplete kovrita de glaĉero, ke al tiuj glaĉeraj epokoj sekvis periodoj kun pli milda klimato. Vi certe ankaŭ aŭdis, ke la Alpoj krejĝis pro puŝo de la afrika kontinento kontraŭ la eŭropa, vi certe pli ol unu fojon aŭdis pri sinklinalo kaj antiklinalo, pri morenoj kaj pri eratika aŭ migra ŝtono, vi certe foje admiris belegajn fosiliojn kaj deziris scii pli multe pri iu bela roka falto dum montara promenado. Eĉ multon pli vi eble scias kaj vi despli ĝojos kompreni la geologion de la laŭzana regiono, ĉar geologiaj observoj ofte koncernas regionojn.

Ĉu vi konas la Teron ?


Mi memoras, ke kiam foje mi volis pliprofundigi miajn konojn pri

tiu scienco, iu konsilis libron en Esperanto. Kaj mi aĉetis *Ĉu vi konas la Teron ?* de Endre Dudich, eldonitan de UEA en 1983. Sed mi, kiu nur deziris kompreni la historion de la foje renkontitaj rokoj, rapide malkuraĝiĝis antaŭ la fakeco de tiu libro. Tamen, komence de tiu jaro, mi ĝin reprenis, kroĉiĝis al la legado de la enkondukaj tekstoj kaj malkovris, ke geologio ne nur interesiĝas pri rokoj, kiel mi tre naive kredis, sed ke tiu scienco entenas multajn fakojn kaj devige malfermiĝas al aliaj fakoj, ke ĝi enhavas ne nur « ne-vivan » branĉon, sed ankaŭ « vivan », kiel paleontologion, kiu studas kaj prabestojn kaj praplantojn. Tiam mi ekkomprenis kial la mamuta skeleto kuŝas en la geologia halo, kaj ne en la zoologia !

Kio estas geologio ?

Do, se vi havas la okazon foliumi *Ĉu vi konas la Teron ?*, eĉ se, kiel mi, vi ne tralegos ĝin kiel romanon, sed kaptante erojn el diversaj partoj, vi iom pli bone komprenos, kio estas geologio.

Vi lernos, ke la malnovgrekaj vortelementoj kunmetitaj en la 18-a jarcento por fari tiun vorton ja signifas « ter-sciencon », sed ke tiu kunmetaĵo havas erarige vastan sencan, « ĉar pri la Tero okupiĝas ankaŭ aliaj sciencoj, ekzemple geografio kaj geodezio (scienco pri mapfarado) ». Kaj tralegante la enhavtabelon vi vidos, ke geologio entenas, interalie, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, ktp.



«Videblas, ke la geologiaj sciencoj okupiĝas pri fizikaj kampoj, atomeroj, atomoj, mineraloj, rok-aĵoj; formacioj, geosferoj, kaj eĉ pri la planedo Tero ĝenerale. Jam estas pasinta la epoko de simpla pri-skribo: interesas nin antaŭ ĉio la moviĝoj de la materiaj objektoj, el

kiuj rezultas la disvolviĝo, la evoluo de la Tero mem.»

Pri geologio en Esperanto

En *Ĉu vi konas la Teron?* vi lernos, ke « Esperanto havas iom da tradicio en la geologiaj sciencoj, eĉ propran fakrevuon *Geologio Internacia*. » Tiu revuo, kiel indikas Vikipedio, havas nun 11 volumojn, la lasta volumo aperinta en 2010.

La aŭtoro daŭrigas: « Skribante ĉi tiun libreton, mi kiom eble vaste uzis la esperant-lingvan fakliteraturon. El la nacilingva literaturo mi elektis por la listo de referencoj nur fundamentajn verkojn. »

Geologio en Plena Ilustrita Vortaro

En la enkonduko de la unua eldono de PIV (1968) pri geologia kontribuo respondecis la muzea kuratoro Halvor Rosendahl ĉe la Universitata Geologia Muzeo de Oslo. Interesas legi, ke « el la abundo da geologiaj terminoj s-ro Rosendahl klopodis elekti la nociojn, kiuj prezentas ĝenerale konatajn geologiajn fenomenojn, nomojn de mineraloj kaj de roksppecoj. Ĉar la nomoj de tiuj nocioj plejparte estas tre internaciaj, ilia esperantigo ne prezentis gravajn problemojn. »

En la revizio, cele al la nova eldono ekaperinta en 2002, la ŝanĝoj pri matematiko, natursciencoj kaj teknikoj estis tre gravaj pro granda evoluo de tiuj fakoj. Senutilaj aŭ ne plu uzataj terminoj estis forigitaj, novaj estis enkondukitaj. Interesas noti, ke en 2002 oni diris, ke la vortaro devas esti enciklopedieca pro

manko de scienca enciklopedio en Esperanto. Nun oni certe ne plu bezonus diri tion pro la ekesto kaj bonkvalita evoluo de Vikipedio, ankaŭ en Esperanto.

Oni povas legi pri nomenklaturaj principoj, ke la aŭtoroj preferis terminojn ricevatajn laŭ la kunmetreguloj de Esperanto, ekz. -nekristala- anstataŭ -amorfa-, -nesimetria- anstataŭ -asimetria-. Foje, male, oni devis forlasi kunmetitajn vortojn, kaj elekti internaciajn terminojn, kiel -petro-n, kiu estis preferita al -rokaĵo-. -petro- signifas : « Konsistiga materialo de la terkrusto, ĝenerale konsistanta el mineraloj, plej ofte malmola kaj kohera, kelkfoje likva (nafto) aŭ eĉ grasa. Argilo, granito esta petroj. » Dum rokaĵo signifas « artefarita aranĝo el naturaj aŭ cementaj rokpecoj en parko, ĝardeno ks. ».

Sed geologio ne nur estas abundo de malfacilaj vortoj !

Feliĉe la nuntempaj geologoj pedagogie progresis por komprenigi kaj igi interesan sian scienccon, foje per humurplenaj detaloj.

En la muzeaj klarigoj kaj flugfolioj (plurlingvaj) de la laŭzana muzeo vi malkovros, ke iu vundo sur la kranio de la *Tyrannosaurus rex*, la tirana reĝo de la reptilioj, la plej granda karnmanĝanta dinosaŭro, povus veni de mordeto dum amorado, kaj en iu montrofenestro de la paleontologia halo vi povos admiri belegan ŝtonon el kiu vi volonte farus juvelon, kiu fakte estas fosiliigita fekaĵo de dinosaŭro ! Tre interesaj la fekaĵoj ! Ili multon instruas pri la manĝkutimoj de bestoj, kiuj vivis milionojn da jaroj antaŭ ni. En

la flugfolio pri la geologia tempo-mezuro vi vidos foton de plurtavola roko en kiu estas duvalva marbesto, tre simila al la nuntempaj, sed 250-milionjara, kaj, en roko ankoraŭ ne finita, kelkmonata ladskatolo !

Vi vidos en la flugfolio pri la subteraj riĉaĵoj, ke geologio ankaŭ havas praktikajn celojn, ekde serĉado pri nafto, karbo, ĝis geotermio, energio por la estonto.

Helpe de kreskajaj kaj animalaj fosilioj vi povos imagi la pejzaĝojn de nia regiono antaŭ miloj aŭ centoj da milionjaroj. Kaj dum la geologia vizito, kiun ni faros dimanĉe tra la laŭzanaj stratoj kaj montetoj, vi povos imagi Laŭzanon, kiam ĝi estis kovrita de molasa altebenaĵo, kiu etendiĝis ekde Savojo ĝis Alemanio antaŭ proksimume 25 milionoj da jaroj. Kaj vi eĉ povos observi spurojn de la tempo kiam tiu molasa ŝtono kreiĝis. Helpe de via imagopovo vi povos promeni en la posta pli « moderna » (nur dumilionjara) glaĉera epoko, kiu vere modlis nian nunan pejzaĝon.

Ja, eĉ infanoj komprenante Esperanton povos esti interesataj kaj ni zorgos pri tio.

Mi do esperas, ke mi donis al vi la deziron veni al la nokto de la muzeoj en Laŭzano. Ĝis la 24-a de septembro !

*Al ĉiuj legantoj
belajn somerajn tagojn kaj
agrablan postferian
rekomencon !*

Rumantsch Grischun

konkurencas la romanĉajn idiomojn


Bruno Graf

La grizonanoj disputas depost jaroj pri la unuecigita Rumantsch Grischun (RG). Nun formiĝas rezistado pro elĉerpitaj idiomaj lerniloj. En la berna gazeto *Der Bund* de la 11a de februaro 2011 aperis artikolo de Simone Rau, kies teksto estas ĉi-sekve esperantigita kaj resumita.

Memore: En Grizono estas kvin retoromanĉaj idiomoj, ne nur parol-

ataj, sed ankaŭ skribitaj. Ekde 1982 ekzistas Rumantsch Grischun, kreita el tri idiomoj kiel superregiona skriblingvo. RG devas fortigi la lingvogrupon, malaltigi la kostojn kaj oficialigi la lingvouzon, ĉar la idiomoj estas minacataj. Spite RG restas pridisputita. La temo interesas esperantistojn, ĉar esperanto estas same planlingvo. Se ĝi antaŭenirus, similaj reagoj estus antaŭvideblaj.

La lingvoregionoj de la romanĉaj idiomoj



1 sursilvana; 2 sutsilvana; 3 surmirana; 4 putera; 5 valadera.

(Laŭ Arthur Baur, *Allegra genügt nicht*, Chur 1996.)

Simone Rau skribas, ke Rumantsch Grischun neniam estis amata. Laŭ la kontraŭuloj tiu artefarita lingvo havas nek koron, nek historiajn radikojn kaj minacas la idiomojn. Forta kontraŭstaro montriĝis en 2003, kiam la grizona parlamento decidis kadre de ŝparplano enkonduki Rumantsch Grischun en ĉiujn romanĉajn lernejojn kaj eldoni no-

vajn lernilojn nur en RG kaj ne plu en kvin idiomoj.

Nun la diskutoj pri RG ekflamiĝis, ĉar la idiomaj lerniloj elĉerpigis. En Engadino kaj antaŭa Rejnvalo formiĝis du asocioj por protekti la idiomojn. La eduka departemento enmiksigis. La aktivuloj postulas reinstrui la idiomojn en la lernejoj kaj reveni al la menciita decido de la

kantona parlamento, ĉar nun RG estas klare privilegiita. Tamen la komunumoj povas mem decidi, ĉu RG kaj la regiona idiomu estu instruataj en la bazaj lernejoj.

La eduka departemento montras komprenemon kaj serĉas solvon kun la Lia Rumantscha, tegmenta romanĉa asocio. Ne same kiel la alemanaj dialektoj, la romanĉaj idiomoj estas parolataj kaj skribitaj, forte enradikigitaj en la kulturo. Aliflanke estas pedagogia problemo, se iuj romanĉaj unuaklasanoj devas lerni ĝis tri skriblingvoj. RG estas hodiaŭ fakto kaj rekonita de la konfederacio.

Instrui principe RG kaj la idiomojn kostus multe tro. Nun la lern-

iloj estas presitaj en la lingvoj germana, itala kaj RG. Eble troviĝos kompromiso kiel interkonsentita inter la instruista asocio de Engadino kaj la kantono : engaĝitaj instruistoj retradukas la RG-lernilon *Vivo en Grizono* en la idiomojn kaj la kantono transprenas la kostojn. La lernantoj ricevas la libron en RG kaj foliaron en la idiomu.

La opoziciuloj ne volas kontentiĝi pri tiu minimuma solvo. La pionirkomunumoj, kiuj enkondukis RG antaŭ kvar jaroj, estas konsternitaj. Laŭ la gazeto *Südostschweiz* oni faris bonajn spertojn kun RG. La demando restas, ĉu la kantono pli komplezos la postulantojn.

Japanaj luktartoj edukaj por junuloj

Mireille Grosjean

Kiu traduko estas la plej bona por la japana esprimo BUDO ? Ĉu militartoj, batalartoj, luktartoj... Mi hezitas... Sed tio ne estas mia temo hodiaŭ.

Esperanto en la Fonduso internacia por la protektado de artoj militaj (FIPAM)

La FIPAM ĵus naskiĝis kaj planis unuan kolokvon kun la temo « Perfortoj, socioj kaj luktartoj ». En la kerna grupo estas esperantisto, kiu proponis, ke nia lingvo aperu en la kolokvo. Ŝi ekrilatis kun gesamideanoj en Francio por esplori, kiu povus prelegi pri tiu temo. De pluraj

personoj venis la indiko : tio estas temo por Mireille Grosjean. Certe pro la fakto, ke mi praktikis aikidon dum 15 jaroj, atingis la nivelon de nigra zono kaj instruis konflikto-solvadon dum 10 jaroj al gejunuloj.

Komence de aprilo 2011 mi povis prelegi pri esperanto kadre de kolokvo de FIPAM en Parizo. Unue mi rapide prezentis nian lingvon, por ke homoj sciu, pri kio ni parolas. Due mi klarigis la ligojn inter aikido kaj Oomoto, japana eklezio ŝintoismeca. Fondintoj de ambaŭ grupoj vivis kune kiel fratoj dum ĉirkaŭ 20 jaroj.

Mi jam antaŭe esploris pri tiuj ligoj kaj pridemandis la historiistojn ĉe Oomoto en Ajabe kaj Kameoka en Japanio dum mia sesmonata restado en 2008-2009. Notindas, ke

Oomoto enkondukis esperanton en la jaro 1923, do precize dum tiu intensa kunlaboro kun la fondinto de aikido.

En mia tria parto mi traktis la kolokvan temon en rilato kun mia instruado dum 38 jaroj : pro respekto mi alvenis akurate, mi preparis interesajn kursojn, mi traktis atenteme la devigan programon. Tion rimarkas la gelernantoj kaj naskiĝas reciproka respekto kaj harmonio. Pri la praktiko de batalartoj mi substrekis, ke nuntempaj gejunuloj volonte iras al tia hobbio pro la fakto, ke luktartoj estas ekzotaj, konsekvence havas prestiĝon. Paralele kun ilia kutima ribelemo kaj provokemo gejunuloj pretas obei en la trejnejo, forpreni siajn ŝuojn en ĝusta loko, sekvi la ĝentilecajn regulojn tute japanecajn.

Tio havas fortan edukan efikon, se la instruistoj, majstroj, havas bonan nivelon kaj mem daŭre plu studas kaj pripensas pri sia arto.



Edukaj luktartoj (el Vikipedio).

Sep fratoj de Alexis Kivi

(rs) La subtitolo de tiu libro precizigas ke temas pri rakonto¹. Fakte temas pri epopeo de 360 paĝoj de la finna verkisto Alexis Kivi (1834-1872) publikigita en la jaro 1870.

Ĝi estas vivanta bildo de la virgaj erikejoj, kulturebligataj ne sen penoj fare de sep fratoj. Ĝi estas ankaŭ vidmaniero de la progresiva evoluo de la primitiva homo al socia vivo organizita.

¹ La difinoj de rakonto varias laŭ la lingvoj. Ekzemple en la germana oni opinias ke rakonto (Erzählung) estas pli mallonga ol novelo aŭ romano, en aliaj lingvoj rakonto povas esti tre longa prozaĵo.



Sep fratoj de bona administranto senhavigita, iama mastro de la bona Jukola, ŝatanto de libero kaj ĉasado, konfliktiĝas kun la komunumo, reprezentita de pastoro, kiu volas trudi al ili la lernadon de la alfabeto. Ili rifuĝas al arbaro de sia bona, kie ili vivas preskaŭ kiel nomadoj ĉasante kaj fiŝkaptante ĝis la tago kiam, post serio da penigaj peripetioj, ili estas devigataj dediĉi sin al agrokulturaj laboroj. Pere de heroaj streĉoj ili ankaŭ lernas legi kaj skribi kaj fine reiras en la socian medion, kie ili estas akceptitaj kiel civitanoj, kiujn oni aŭskultas kaj respektas. Ĉi tiu romano pri moroj kaj aventuroj satiraj kaj epopeaj, por kiu la aŭtoro laboris dum deko da jaroj, estas lia ĉefverko. Per ĝia realismo, ĝia tono ŝajne populara, mikso de idilio kaj

farso, ĝiaj rabelezaj scenoj kaj ĝia etoso de romantikaj legendoj, la verko rompita kun la konvencia romantismo de iuj literaturaj medioj finnaj kaj provokis la furiozon de la akademia kritiko. Hodiaŭ oni konsideras ĝin probable kiel la plej grandan romanon de la finna literaturo.

La esperanta traduko el la jaro 1947 de Ilmari Ekström, zorge reviziita de finnaj kaj alilingvaj kompetentuloj sub la respondeco de Vilho Setälä, sukcesis redoni la konversacian stilon en popola lingvo spicita per citaĵoj el la Biblio kaj per popolaj dirmanieroj. La nigra-blankaj vinjetoj de la artisto Ahto Numminen plaĉe beligas la bone binditan libron presitan preskaŭ sen eraroj.

Kolekto de poŝtmarkoj

Karel Čapek

Elĉeĥigis Miloš Lukaš

Unue aperis en *la nica literatura revuo* n-ro 26/1959, paĝoj 69-74.

« Tio do estas nepra vero », diris la maljuna sinjoro Karas. « Se la homo trafosus sian pasintecon, li trovos, ke estas en ĝi sufiĉe da materialo por vivoj tute aliaj. Foje ... aŭ erare, aŭ pro inklino ... li elektis nur unun el ili kaj tutvivis ĝin ĝisfine; ekstreme malbona fakto tamen estas, ke la aliaj vivoj, la eventualaj, ne estas tute mortaj. Kaj iam okazas, ke oni sentas en ili doloron kvazaŭ en amputita kruro.

Kiam mi estis proksimume dek-jara knabo, mi komencis kolekti poŝtmarkojn; al la patro tio malplaĉis, li opiniis, ke mi pro tio neglektos la lernejdevojn, sed mi havis kamaradon, Aloĉjon Cepelka, kaj kune kun tiu mi fordonis min al la filatelista pasio. Tiu Aloĉjo estis filo de gurdisto, bubo hirhara kaj lentughava, ĉirkaŭŝirita kiel pasero, kaj mi amis lin, kiel nur infanoj scias ami sian kamaradon. Nu, mi estas maljuna homo; mi havis edzinon kaj infanojn, sed kredo al mi, ke neniu homa sento estas tiel bela kiel la amikeco. Tiun tamen la homo kapablas havi sole dum li estas juna; poste li, por tiel diri, krustiĝas kaj iĝas egoisto. Amikeco elfontas ja

ekskluzive el entuziasmo kaj admiro, el superabundo da vivo, el multeco kaj troo da sento ; oni havas tiom da ĝi, ke oni devas al iu ĝin donaci. Mia patro estis notario, la matadoro de la lokaj eminentuloj, ege digna kaj rigora sinjoro ; kaj mi en mian koron enmetis Aloĉjon, kies patro estis drinkema gurdisto kaj kies patrino estis lackkonsumita lavistino, kaj mi tiun Aloĉjon estimis kaj adoris, ĉar li estis pli lerta ol mi, ĉar li estis memstara kaj kuraĝa kiel rato kaj ĉar li havis sur la nazo lentugojn kaj ĉar li ŝetadis ŝtonojn per la maldekstra mano – mi eĉ ne scias plu, kiujn ceterajn el liaj ecoj mi tiom amis ; certe tamen tio estis la plej granda amo en mia vivo.

Tiu Aloĉjo do estis mia konfidenculo, kiam mi komencis kolekti poŝtmarkojn. Iu el vi diris, ke sole viroj havas komprenon pri kolektoj ; li pravas ; mi opinias, ke tio estas postrestaĵo aŭ instinkto el tiu epoko, kiam ĉiu viro kutimis kolekti la kapojn de siaj malamikoj, rabbitajn armilojn, ursofelojn, cervokornojn kaj entute ĉion, kion li povis rabakiri. Sed kolekto da poŝtmarkoj, tio ne estas nur posedaĵo, tio estas eterna aventuro ; oni kvazaŭ tremante tuŝas pecon de tiu malproksima lando, ekzemple Bhopalo, Bolivio aŭ Kabo de Bona Espero ; oni simple havas kun la ekzotaj landoj kvazaŭ personan kaj intiman kontakton. En la kolektado de poŝtmarkoj estas do ia elemento de vojaĝado kaj marveturado kaj entute de la vira mondveturemo. Io laŭ la maniero de la krucaj militiroj.

Kiel mi jam diris, al mia patro tio malplaĉis ; la patroj ordinare ne estas

kontentaj, se iliaj filoj faras ion alian ol ili mem ; mi, sinjoroj, traktis miajn filojn ankaŭ same. La patreco ĝenerale estas sento kvazaŭ miksa ; enestas en ĝi granda amo, sed ankaŭ la antaŭjuĝo, malfido, malamikeco, aŭ kiel mi tion esprimu ; ju pli multe iu siajn infanojn amas, des pli multe el tiu alia sento estas en li. Mi devis do kun mia poŝtmark-kolekto min kaŝi en la subtegmento, por ke mia patro ne trafu min. En la subtegmento staris malnova ŝrankokesto, tielnomata farunujo, kaj en tiun ni enrampis kiel du musoj kaj unu al la alia montris la poŝtmarkojn : Rigardu, jen Nederlando, jen Egiptio, jen Sverige, alinome Svedio. Kaj ke ni kun tiuj trezoroj devis nin kaŝi, tio estis afero preskaŭ same ĉarma kiel peko. Kiel mi la poŝtmarkojn al mi havigadis, tio estis alia aventuro ; mi vizitis konatajn kaj nekonatajn familiojn, petegante, ke ili permesu al mi malglui la markojn de sur malnovaj leteroj. Kelkloke oni havis en subtegmento aŭ en skribotablo tirkestojn plenajn de malnovaj paperoj ; tio estis miaj plej feliĉaj horoj, kiam mi, sidante surplanke, estis trafosanta amasojn da polvokovritaj paperaĉoj kaj serĉanta poŝtmarkon, kiam mi ĝis tiam ne posedis – duplikatojn mi azeno ja ne kolektis ; kaj se okazis, ke mi trovis malnovan Lombardion aŭ mi-nescias-kiun el la germanaj ŝtatetoj aŭ civitoj, mi sentis ĝojon preskaŭ turmentan – ĉiu ega feliĉo ja kaŭzas ian dolĉan doloron. Kaj dume ekstere atendis min Aloĉjo, kaj post kiam mi fine eliris, mi flustris tuj en la pordo : Aloĉjo, Aloĉjo, mi trovis tie unu Hanovron ! – Ĉu vi havas ĝin ?

– Jes ! – Kaj ni jam kuregis kun la kaptajo hejmen, en nian farunuĵojn.

En nia urbeto estis teksfabrikoj kaj diversaj fuŝmanufakturoj de juto, kalikoto, katuno kaj kotonajoj ; tiu-specajn varaĉojn oni nome produktas ĉe ni speciale por la koloraj rasoj de la tuta terglobo. Tie oni do permesis al mi serĉi poŝtmarkojn en paperkorboj ; tio estis mia plej riĉa ĉasejo ; tie oni povis trovi Siamon kaj Sud-Afrikon, Ĉinion, Liberion, Afganion, Borneon, Brazilon, Nov-Zelandon, Hindion, Kongon – mi ne scias, ĉu jam la nuraj nomoj sonas por vi tiom mistere kaj kvazaŭ sopirige. Dio mia, kia plezuro, kia kolosa plezuro estis trovi ekzemple markon el la Markolaj Kolonioj – Aŭ Koreon ! Nepalon ! Novan Gvineon ! Sieraleonon ! Madagaskaron ! Ha, tian ekstaziĝon kapablas kompreni nur ĉasisto aŭ trezorserĉisto aŭ arkeologo entreprenanta fosesplorojn. Serĉi kaj trovi, jen la plej alta streĉeco kaj kontentiĝo, kian povas la vivo al homo liveri. Ĉiu homo devus ion serĉi ; se ne poŝtmarkojn, do la veron, aŭ oran filikon, aŭ almenaŭ ŝtonajn sagojn kaj tomburnojn.

Tio do estis la plej belaj jaroj de mia vivo, la amikeco kun Aloĉjo kaj la filatelado. Poste mi malsaniĝis je skarlatino, kaj Aloĉjon oni ne lasis veni al mi, kvankam li staradis en nia koridoro kaj fajfis, por ke mi aŭdu lin.

Foje, ĉar oni forgesis min atenti aŭ ial – unuvorte, mi forkuris el la lito, kaj huŝ ! mi rapidis en la subtegmenton por rigardi miajn poŝtmarkojn. Mi estis tiom senfortiĝinta, ke mi apenaŭ levis la fermilon de la

kesto. Sed la kesto estis malplena ; la skatolo kun la poŝtmarkoj estis for.

Miajn doloron kaj teruriĝon mi ne kapablas al vi priskribi. Mi opinias, ke mi staris tie kvazaŭ ŝtonigita kaj eĉ plori ne povis, tiel gorĝopremata mi sentis min. Unue estis terure, ke miaj poŝtmarkoj, mia plej granda plezuro, estas for ; sed ankoraŭ pli terure estis, ke certe ilin forŝtelis Aloĉjo, mia unusola amiko, dum mi malsanis. Jen kia konsterniĝo, seniluziĝo, malespero, kordoloro – ha, estas mireginde, kion povas tia infano travivi. Kiel mi el la subtegmento eliĝis, tion mi ne plu scias ; sed poste mi denove akute febris kaj en pli klaraj momentoj malespere meditis. Nek al la patro nek al la onklino mi diris tion – la panjon mi jam ne havis ; mi sciis, ke ili tute ne komprenas min, kaj per tio mi iel fremdiĝis al ili ; de tiam mi ne plu havis al ili proksiman kaj infanan rilaton. La perfido de Aloĉjo, tio estis por mi bato preskaŭ mortiga ; ĝi estis mia unua kaj plej granda prihoma seniluziĝo. Almozulo, mi diris al mi, Aloĉjo estas almozulo, kaj tial li ŝtelas ; jen kion mi havas de tio, ke mi kamaradis kun almozulo. Kaj ĉi tio obstinigi min ; de tiam mi komencis diferencigi la homojn – mi perdis la staton de socia virgeco ; sed tiutempe mi ankoraŭ ne sciis, kiel profunde min skuis la afero kaj kiom en mi ruiniĝis.

Resaniĝinte el la febroj, mi resaniĝis ankaŭ el la doloro pri la perdo de la poŝtmarkkolekto. Pikon en la koro mi nur ankoraŭ eksentis vidante, ke Aloĉjo intertempe akiris novajn kamaradojn ; sed kiam li al mi alkuris, iom embarasita post la

tiel longa paŭzo, mi diris al li seke kaj maturule : « For de mi ! Mi kun vi ne parolas. » Aloĉjo ruĝiĝis kaj post momento diris : « Ankaŭ bone. » Kaj de tiam li min tiel obstine kaj proletece malamis.

Tio do estis la okazaĵo, kiu influis mian tutan vivon, mian vivoselekton, kiel dirus jen sinjoro Paulus. Por tiel diri, mia mondo estis profanita ; mi perdis la konfidon al la homoj ; mi eklernis malami kaj malestimi. Neniam plu mi havis kamaradon ; kaj maturiĝinte mi eĉ komencis fieri pro tio, ke mi estas sola, ke mi nenium bezonas nek volas iun pardoni. Poste mi trovis, ke neniu min amas ; ĉi tion mi interpretis al mi tiasence, ke mi mem malŝatas la amon kaj tute ignoras ĉian sentimentalecon. Kaj ĉi-maniere mi fariĝis homo fiera kaj ambicia, sinzorgema, pedanta kaj entute korekta ; mi severe kaj malmilde traktis miajn subulojn : mi edziĝis sen amo, la infanojn mi edukis al disciplino kaj timo, kaj per miaj diligento kaj konscienco mi akiris nemalmultajn meritojn. Tio estis mia vivo, mia tuta vivo ; mi rigardis nenion krom tio, kio estas mia devo. Post kiam mi finos mian vivon, eĉ en gazetoj oni legos, kiel multmerita kaj modelkaraktera laborulo mi estis. Sed se oni scius, kiom da soleco, malkonfidemo kaj obstino en tio enestas ...

Antaŭ tri jaroj mortis mia edzino. Mi tion konfesis nek al mi mem nek al aliaj, sed mi sentis min terure malgaja ; kaj pro tia melankolio mi elserĉis diversajn familiajn memoraĵojn, kiuj postrestis de la patro kaj patrino : fotografiaĵojn, leterojn, miajn malnovajn lernejkajerojn – mi

eĉ sentis sufokpremon en la gorgo, vidante, kiel zorgeme mia severa paĉjo ilin konservis kaj kaŝis ; mi opinias, ke li tamen amis min. En la subtegmento estis ŝranko plena de tiaj objektoj ; kaj sur la fundo de unu tirkesto estis skatolo sigelita per la sigeloj de mia patro ; malferminte ĝin, mi trovis en ĝi la poŝtmarkokolekton, kiun mi faris antaŭ kvindek jaroj.

Mi volas al vi nenion malkonfesi : el miaj okuloj eltorentis larmoj, kaj la skatolon mi portis en la ĉambron kiel trezoron. Ĉi tiel do statis la afero, tuj mi tion ekkomprenis ; kiam mi tiame estis malsana, iu trovis la kolekton kaj la patro ĝin konfiskis, por ke mi pro ĝi ne neglektu la lernadon ! Li estus devinta ne fari tion : tamen ankaŭ en tio speguliĝis lia siaspeca severa zorgo kaj amo ; mi ne scias kial, mi komencis subite bedaŭri same lin kiel min mem ...

Kaj poste mi ekrememoris : Aloĉjo do ne ŝtelis de mi la poŝtmarkojn ! Dio mia, kiel maljuste mi agis kontraŭ li ! – Mi denove imagis la lentughavan kaj ĉirkaŭŝiritan stratbubon – dio scias, kio el li fariĝis kaj ĉu li ankoraŭ vivas ! Ho, kiom ĝene kaj hontige estis por mi ĉion ĉi revoki en mian memoron ! Pro la sola falsa suspekto mi perdis mian unusolan kamaradon ; pro ĝi mi perdis mian infanecon. Pro ĝi mi komencis malŝati la malriĉan aĉularon ; pro ĝi mi kondutis arogante ; pro ĝi mia koro al neniu plu alligiĝis. Pro ĝi mi dum la tuta vivo ne povis rigardi poŝtmarkon sen antipatio kaj abomeno. Pro ĝi mi neniam skribis al mia fianĉino kaj edzino kaj maskis tion per la preteksto, ke mi super-

staras elmontrados de sentoj ; kaj mia edzino suferis de tio. Pro ĝi mi estis tiel malmilda kaj izolita. Pro ĝi, nur pro ĝi mi atingis tian karieron kaj plenumis tiel modele miajn devojn.

Mi denove vidis mian tutan vivon ; ĝi subite ŝajnis al mi dezerta kaj sensenca. Venis al mi la ideo, ke mi povis ja vivi tute alie. Se tio ne estus okazinta – enestis en mi tiom da entuziasmo kaj aventuremo, amo, kavalireco, revado kaj konfido, aferoj strangaj kaj senbridaj – ho dio, mi povis ja fariĝi io ajn alia, vojaĝisto, aŭ aktoro, aŭ soldato ! Mi estus ja povinta ami la homojn, drinki kun ili, kompreni ilin, mi ne scias kion, ĉion ! Mi havis impreson, kvazaŭ en mi degelus ia glacio. Mi pririgardis la poŝtmarkojn laŭvice : estis tie ĉiuj, Lombardio, Kubo, Siamo, Hanovro, Nikaragvo, Filipinoj, ĉiuj landoj, kiujn mi tiutempe volis viziti kaj

kiujn mi nun jam ne vidas. Sur ĉiu poŝtmarko estis peco de io, kio povis okazi, kaj kio ne okazis. Mi sidis super ili dum tuta nokto kaj juĝis mian vivon. Mi vidis, ke ĝi estis ia vivo fremda, artefarita kaj nepersona, kaj ke mia efektiva vivo tute ne efektiviĝis. » – Sinjoro Karas svingis la manon. – « Kiam mi pripensas, pri ĉio, kio povis esti kaj kiel maljuste mi kontraŭ tiu Aloĉjo agis ... »

La pastro Voves, aŭskultante ĉi tiun parolon, estis tre afflita kaj malgaja ; li verŝajne rememoris ion el sia propra vivo. « Sinjoro Karas », li diris sentimentale, « ne pensu pri tio ; jen vana afero, ne plu rebonigebla, oni ne povas ja rekomenci – »

« Oni ne povas », ekĝemis sinjoro Karas kaj iomete ruĝiĝis. « Tamen almenaŭ – almenaŭ tiun kolekton mi komencis fari al mi denove ! »



Studsabato en CDELI la 19-an de februaro 2005 (fotis Andrée Gacond).



Svisa kalendaro

Vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand
www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Aŭguste

- 27 : Chaux-de-Fonds : SES-Festotago.
27-28 : La Sagne : Postfestoj en La Sagne.

Septembre

- 7 : Wil : EKW-Kunveno.
24-25 : Lausanne : Tutsvisa Kultura Sabato.
25 : Basel : ESB-Ekskurso.

Oktobre

- 3 : Lausanne : LES-Kunveno.
10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
14-16 : Richterswil (ZH) : SFERO.
22 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
28 : Basel : ESB-Kunveno.

Novembre

- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
19 : Chaux-de-Fonds : ILEI-Kunsido.
24 : Basel : ESB-Kunveno.

Decembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
7 : Wil : EKW-Rakledvespero.
10 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato festa.
10 : Basel : Zamenhofa festo en Svislando.
15 : **Redakta datlimo de SES informas.**
17 : Lausanne : LES-Zamenhofa Festo.

2012 Januare

- 9 : Lausanne : LES-Kunveno.
21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Februare

- 6 : Lausanne : LES-Kunveno.
10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Marte

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Aprile

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.
21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
28 : Vevey : SES : Ĝenerala Kunveno.

Maje

- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Junie

- 16 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Julie

- 1 : **Redakta datlimo de SES informas.**

Peto de la redaktoro

Bedaŭrinde la redaktoro kapablas anonci nur tion, kio estis sciigita al li mem. Tial li petas la asociojn kaj grupojn konigi la okazontaĵojn ne lastminute, sed konsiderante la redaktajn datlimojn, kiuj estas anoncigitaj en la kalendaro. Ankaŭ raportoj pri la okazintaĵoj bonvenus.

Atentu ! La Svisa Kalendaro videblas aliflanke de tiu ĉi kovrila paĝo



Por konatiĝi kun la vivo de tiu alciono kaj de aliaj birdoj kaj sovaĝaj bestoj vivantaj en la ĵurasa montaro **profitu pri la filmprezento de la 28a de aŭgusto en La Sagne.**

-o0o-



Internacia grupeto el la 96a UK, Kopenhago (de maldekstre):

Mirejo Grosjean, Svislando ; Martin Schäffer, Meksiko ; Alinka Pokhrel, Nepalo ;
Stefano Keller, Svislando ; Indu Devi Thapaliya, Nepalo ; Maritza Gutiérrez González, Kubo ;
Latifou Gbadamassi, Benino ; samideano verŝajne el Francio ;
kaŭrantaj : Barbara Pochanke, Svislando kaj Parashar Rijal, Nepalo.